

V-49793/22,

(1934)

# SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE



*La bildo: Kristnaska festo en la grupo de Ulricehamn. En la unua vico meze la "hejma koboldo". (Pri kristnasko vidu cetere "Letero al..", p. 3)*

Kion la unuaj tagoj de la nova jaro alportis:

Aliĝis al Sveda Esperanto-Federacio ankoraŭ unu Esperanto-unuiĝo, tiu de Ulricehamn. Bona signo por la kongresa jaro.

N:r 1.  
N-o 1.

Januari 1934.  
Januaro 1934.

Pris 25 öre.  
Prezo 25 oeroj.





Hans Kristoferson och Bronslaw Gimpel.

Om en svensk universitetslektors arbete i främmande land berättar svenske lektorn i Rom fil. dr Hans Kristoferson kl. 7.50 på tisdagen. Utsändningen sker från Göteborg. Från samma stad sändes även ett solistprogram kl. 8.5 och medverkande är bland andra violinisten Bronislav Gimpel.

*Manuale de Esperanto. Miniatyrilärobok med ordlista. . . . . 0:10*  
*Dubbel Fickordbok i Esperanto. Av Carl Ohlsson. Svensk-Esperantisk o. esperantisk-svensk ordbok. 1:50*  
*Esperantisk-svensk Ordbok. Av P. Nylén. 232 sid. . . . . Häft. 3:75*  
*D:o, inb. i hållbart klotb. . . . . 5:—*  
*Svensk-Esperantisk Ordbok. Av G. H. Backman. För tillf. slutsäld.*  
*Esperanto-Ordbok. Av N. Nordlund. 1:—*  
*Prepositionerna i Esperanto. Av N. Nordlund. . . . . 0:75*  
*Fundamenta Krestomatio. Av D:r L. L. Zamenhof. Läsestycken avsedda att utgöra mönster för god esperantostil. . . . . 3:25*  
*Dialogoj en Esperanto. Por kursoj kaj grupaj kunvenoj. Av Einar Dahl. 32 sid. . . . . 0:50*

**Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.**  
 Box 698, Stockholm 1. Postg. N:r 578.  
 Tel. 3165 01.  
 Kont. o. exp.: Sveavägen 98 5 tr. Kl. 9-17.  
 Order överst. 10 kr. försänd. portofritt. Vid ins. av förskottslikvid för mindre order bif. 10 proc. till portokostnader. Fullständig prislista på begäran gratis och franko.

**SVENSKA  
 ESPERANTO-TIDNINGEN  
 LA ESPERO**

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

Redaktör: Bernhard Eriksson.  
 Postadr.: Biblioteksgat. 30, Stockholm.  
 Tel. 10 53 27, 11 27 53.  
 Prenumerationspris: Helt år kr. 2:50.  
 Lösnummer 025.  
 Annonpris: 15 öre pr mm.  
 Utkommer en gång i månaden.

**SVEDA ESPERANTO-GAZETO**

Redaktanto: Bernhard Eriksson.  
 Adreso: Biblioteksgatan 30, Stockholm.  
 La administracio: Box 698, Stockholm.  
 Anonco pri korespondado kostas  
 2 respondkuponojn.  
 Abono eksterlanda: 1 jaro 3:— sv. kr.

**Svenska Esperanto-Förbundet  
 (Sveda Esperanto-Federacio)**

Adress: Stockholm 1.  
 Sekretariatets adress: Fredsgatan 4.  
 Postgirokonto N:r 2012.  
 Arsavgift för direkt anslutna medlemmar kr. 5:— inberäknat pren.-avgiften för Svenska Esperanto-Tidningen.  
 Ordförande: Paul Nylén, Huddinge.  
 Telefon: Huddinge 279.  
 Sekr.: Ernfrid Malmgren, Heleneborgsgat. 6, Stockholm. Tel. 41 03 04.

**Svenska Esperanto-Institutet**

Postadr.: Box 698, Stockholm.  
 Postgiro 515 11.  
 Avd. för examens- och språkfrågor: Rektor Sam Jansson. Tel. Lidingö Villastad. 295. — Avd. för ekonomi, statistik, kurser: E. Malmgren.

**Sv. Lärares Esperanto-Förbund  
 (Sveda Instruista Esperanto-Federacio)**

Ordf.: Thorsten Torbjär, Mariagat. 15, Göteborg.  
 Sekr.: Gustav Rimberth, Kommendörs-gatan 41, Göteborg.  
 Kassör: Oskar Svantesson, Karl Johans-gatan 61, Göteborg.  
 Arsavgift 2:— kr.

# ESPERANTO-TIDNINGEN

## LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE



### Esperanto i Radios vårprogram.

(5 × 20 = 100.)

Radiotjänst har beslutet att själv övertaga anordnandet av esperantoundervisningen i Radio under vårterminen 1934. Man tyckte sig icke kunna ge mera än tillsammans 100 minuter åt esperanto, då detta ämne icke ansågs vara av allmänt intresse. Efter långa diskussioner fram och tillbaka, vilket bl. a. har tvingat Radiotjänst att uppskjuta första utsändningen till *andra söndagen i februari*, har det nu bestämts, under förutsättning att lämplig ledare kan erhållas, att varje utsändning skall upptaga ett föredrag på esperanto om något allmänt ämne av ledaren eller eventuellt av annan person. För att relativt nya esperantister skola kunna följa med föredraget, utskickar Radiotjänst, såsom förut tillkännagivits, före varje utsändning ett kursblad, i vilket meddelas det huvudsakliga innehållet av föredraget samt några av de förekommande esperantoorden. Ett visst stöd få de studerande av denna anordning, särskilt som ledaren skall se till att föredragen inte bli för svåra i språkväg och att de första hållas lättare än de senare samt röra sig med sådana ord och grammatiska företeelser, som redan kunna tänkas inlärdas.

Den som vill dra nytta av dessa föredrag bör i första hand läsa eller ha läst Sv. Esp.-Förbundets korrespondenskurs Nr. 1 och i andra hand skaffa sig Radiotjänsts kursblad. Den förra rekquiritas under adress Fack 698, Stockholm 1, och kostar jämte Dahls Dialoger, som i detta sammanhang ansetts kunna göra sin nytta, 1:50. Kursbladen beställas direkt hos Radiotjänst, Kungsgatan 8, Stockholm, och kosta inalles 50 öre.

Röster i Radio torde lämna ytterligare meddelanden om denna s. k. kurs, och möjligen också om de tillfällen att lyssna till esperanto, som lämnas av utlandets radiostationer. Skulle icke så ske, så veta vi att Radiolyssnaren har en resume över esperantosändningar. Särskilt vilja vi påpeka den serie lektioner, som sändas från Finland varje onsdag kl. 18,15—18,40 med Setäläs Esperantokurso (pris 50 öre) som studiematerial. Den har anordnats på begäran av 2000 lyssnare (vår petition upptog 17,000 namn) och börjar 17 januari. Det kan vara ledsamt att behöva gå över ån efter vatten, men det är nödvändigt, så länge vår radio är så knusslig mot esperanto.

## Novaj kursoj en Stockholm.

Post tre sukcesa laboro en Lidköping ĉies nia doktoro Szilágyi nun revenis al Stockholm por gvidi novajn esperanto-kursojn. Jam en la aŭtuno d-ro Szilágyi gvidis sukcesplenajn kursojn en Norra Latin laŭ sia nova, jam fama bildmetodo. Tiu metodo estas tre bona, ĉar dum la lernanto aŭdas la instruiston diri la esperantan vorton, li samtempe vidas ĝin sur blanka tabulo, kaj krome li ankaŭ vidas la agon aŭ signifon de la vorto esprimita per humora bildo.

Post la fino de la aŭtunaj kursoj, la gelernintoj ne sukcesis trovi sufiĉe laŭdajn vortojn pri la ĝojiga instruado kaj pri sia simpatia instruisto. Tion ankaŭ pruvas la fakto, ke preskaŭ ĉiuj poste sin anoncis al supera kurso, kiu nun okazas en Norra Latin kaj en kiu la studentoj iras la lastajn paŝojn sur la vojo, kiu kondukas al plena scipovo de nia lingvo.

La printempaj kursoj, kiujn nun gvidos d-ro Szilágyi, komenciĝis per granda kunveno kaj propaganda vespero en Auditorium 15.1. (ĉeestis pli ol 1000 personoj), kiam parolis profesoro Colinder, rektoro Jansson, d-ro Szilágyi kaj nia hinda amiko d-ro Sinha. Kaj certe la kursoj sukcesos kaj ni povos anonci multajn novajn esperantistojn al la kongreso, kiam la instrua laboro kuŝas en tiel lertaj manoj, kiel tiuj de d-ro Szilágyi.

S.H-n.



**ÄR EDER KLUBB** ansluten till Svenska Esperanto-Förbundet?!

### *Resehandbok på esperanto över Rom.*

För två år sedan utgav italienska turistföreningen en resehandbok på esperanto över »Milano och de lombardiska sjöarna». Uppmuntrad av det intresse denna handbok rönt har föreningen nu beslutat utge en liknande handledning över Rom.

Norge gör också turistreklam på esperanto. Landslaget for Reiselivet i Norge medsänder i flera av sina prospekt broschyrer även på esperanto.

**KONGRESSEN!** Anmäl Eder nu!

## La grandaj esperantokursoj de Seppik en Gotenburgo.

S-ro H. Seppik povas alproprigi al si la famajn vortojn »mi venis, mi vidis, mi venkis». Lia laboro en Gotenburgo ankaŭ aldoniĝas al liaj multaj venkoj. Ges-roj Seppik venis al ni kaj komencis ĉi tie siajn kursojn en la komenco de okt. En la kursoj partoprenis en ses diversaj studrondoj ne malpli ol 203 personoj. La finfesto por la kursoj de Seppik okazis 24.11 en la granda aŭlo de Chalmers. Ja estas nenecese ĉi tie antaŭ esperantista publiko akcenti, ke la »esperantistigo» de s-ro Seppik estas perfekta, sed menciinde estas, ke la urba estrarano, rektoro de la loka ABF, ĉefinstruisto Ernst Jungen, ankaŭ parolis ĉe la festo, kiel ankaŭ s-ro Sinha. Pri la finlecio de la kursoj ĉiuj plej gravaj ĵurnaloj en la urbo raportis.

S-ino Seppik havis du kursojn, en Agnesberg kaj en Surte, kun po ĉ. 20 partoprenantoj.

26.11. oni en Margaretaskolan festene finis la kursojn ĉe taso da teo kaj perkanto kaj muziko dankis al la kursgvidintoj.

Tuj post la malapero de la eksterlandaj geïnstruistoj sub la Gotenburgan horizonton, la klubo de ABF prizorgis daŭrigajn kursojn. S-ro Sjölander gvidas la literaturan studrondon kun 20 part., s-ro Ekström du kursojn kun po 25 p., subskribinto unu kurson kun 42 p. kaj unu kurson en Surte kun 25 p. Krome s-ro Ekström gvidas kurson en Tolltorpsdalen kun 11 p., s-ro Jönsson en Rambergstaden kun 15 p., s-ro Atterfors en Ellsedal kun ĉ. 20 p. kaj s-ro Lindqvist en SKF kun ĉ. 15 p. Ĉiuj kursoj pli-malpli rilatas al la laboro kaj propagando de la klubo de ABF.

Dum la restado de s-ro Seppik en la urbo, li estis ekspluatata kiel preleganto de la urbo antaŭ ne malpli ol 2000 infapopollerneja inspektoro d-ro Lundgren, li faris paroladojn en diversaj lernejoj en la urbo antaŭ ne malpli ol 2000 infanoj. Tiuj prelegoj vekis kelkloke tre grandan intereson kaj atenton. O.S.



**ENDAST 35 ÖRE** per medlem är klubbarnas kvartalsavgift till Svenska Esperanto-Förbundet.



## 60-jarulo.



Hans Andersson.

Nia amiko Hans Andersson naskiĝis blinda (21.XII.1873), li do neniam vidis, kiel aspektas la mondo, sed tamen li havas tre klaran imagon pri la medio, en kiu li vivas, kaj pri la homoj. Sola li promenas sur la stratoj de la grandurbo; oni vidas, ke li iras trankvile sur trotuaro kaj subite li turnas sin en ortangula direkto kaj transiras decide la straton: subkantante por si konatan kanton, li scias laŭ sperto, ke precize ĉe la fina tono, se li iras laŭ sia ordinara irrapido, li sin trovas antaŭ la pordo, kiun eniri. Oni nomas lin »la profesoro«, ne dirante ĉu pro lingvoscio, ĉu pro kantarto, aŭ pro kvieta kaj kontenta humoro. Kiel esperantisto A. estas veterano: la jarcento kaj lia esperantisteco estas dunnaskitoj («ĝemeloj» diras modernuloj). En la pasintjara printempo li faris en la Stokholma grupo bonegan paroladon pri Esperanto ĉe la blinduloj. Gratulojn!

-n.

— ★ —

### Propaganda på esperanto är effektiv.

I Estland anordnas varje år en större sångarfest. Till detta års fest hade man sänt ut broschyrer om densamma även på esperanto. Detta visade sig vara ett mycket gott sätt att göra sångarfesten känd. Genom esperantisternas förmedling inflöto artiklar om evenemanget i ett flertal utländska tidningar. Ej mindre än 20 olika språk voro representerade bland de tidningsurklipp, som inflöto till ledningen för sångarfesten.

de maldekstre: Ezitrom, Oru, Szilágyi, Mui  
Bianchi vidis sur sia partio  
Mui estas memproble  
la fotograf

## Korajn salutojn. Bonan hejon. Letero al la onklino.

F. Szilágyi.

Onklino, la tempo flugas. Antaŭ du monatoj mi skribis al vi mian lastan raporton pri la bela Svedlando kaj nun jam mi devas konstante cerbumi pri la nova dato, ĉar mia malrapidema cerbo estas ankoraŭ ligita al la antaŭa dato, 1933. Sed kie la antaŭa jaro estas? Jam dense kovris ĝin la ĵus falinta neĝo kaj jam delonge mi enterigis ĝin — gajemalgaje — en la loĝejo de afabla samideanino kaj en la gajaj stratoj de la neĝokovrita bela Stockholm. Kaj en la gajeco de la festanta urbo momenton mi haltis por deziri al la tuta homaro, — do ankaŭ al vi kaj al mi — feliĉan, pli feliĉan novan jaron, ol estis la detronigita antaŭa.

estas  
ĉe mi

La jam delonge atendita neĝo do alvenis, transprenis sian regnon en Svedlando, kie ĝi estas potenco, plezuro. Sen neĝo la vintro ne estas vintro, sed la neĝo sorĉas ĝojon al la vizaĝo de la plej seriozaj svedoj. Ankaŭ hejme, en Budapeŝt, la neĝo estas gajege salutata de tiuj senlaboruloj, kies vivzorgojn iom malpliigas la laboro, — la pano — falinta el la ĉielo. La neĝo signifas en nia lando laborokazon. En Svedlando la neĝo estas institucio, sanktaĵo kaj eĉ en Stockholm mi ne vidis, ke oni tiel rapide, maldelikate ekstermus la ĉielan blankaĵon, kiel en niaj urboj. Oni diras, ke la nuna vintro estas escepta, la neĝo alvenis kun forta malfruo; vere en Lidköping mi apenaŭ vidis neĝon.

Eble alian fojon mi parolos al vi pri la vivo de la svedaj urbetoj, — nun mi ja havas malmulte da tempo kaj loko, tamen mi devas menci, ke mi pasigis la lastajn monatojn en la supre menciita ĉarma urbeto, kies plej menciindaj gravajoj estas la varme batantaj samideanaj koroj, kaj malgaja rememoro restos al mi la nebula, antaŭkristnaska mateno, kiam la vagonaro forportis nin el tiu urbeto kaj en la nebulo malaperis la siluetoj de la urbo, de la stacidomo kaj malaperis ankaŭ la figuro de amiko, enkorpiĝo, aŭ ĉirkaŭkorpiĝo de noblaj, amikaj sentoj.

KONGRESSEN! De bästa platserna på teater, konsert o.s.v. ges åt de tidigast anmälda.



*Kastelo de Läckö.*

Kristnasko! — Jes, pri tio mi diros al vi kelke da vortoj, sed — laŭ mia kutimo — ankaŭ nun mi almetas foton, — rigardu — jen la bela kastelo en Läckö, apud la lago Vänern (oni povus nomi tiun lagon maro, laŭ la grandeco.) Oni diras, ke el la historie tre interesa kastelo belega panoramo estas videbla al la lago, mi mem estis tie, sed bedaŭrinde, pro la envia nebulo apenaŭ mi vidis eĉ miajn kun-ekskursantojn; nu — parte pro ili — ĉar ofte ili — duope — malaperis en la zigzagaj koridoroj de la kelkcentjara romantika kastelo. Mi devas konfesi, ke la plej impresplena parto de la kastelo estas laŭ mi unu el la plej malplenaj muroj, sur kiu pendas katalog-numero. Sur tiu loko iam pendis giganta kaj valorega pentraĵo, kiun oni aŭkciis en la komenco de la XIX-a jarcento por 75 oeroj. Neniam mi havis similan bonŝancon, aŭ eble oni neniam povas ekkapti la sinproponantan bonŝancon.

Kristnasko! La eksterajoj de la sveda festo ne estas tre diferencaj de niaj kutimoj: kristabio, ornamoj, kiel en nia lando, eble la sola diferenco, ke oni ne nur la abion ornamas, sed ankaŭ la ĉambrojn, eĉ la domojn, kaj anstataŭ la kristanĝelo la ruĝvestita, longbarba gnomo havas gravan rolon. Sed en la esenco estas ia diferenco. Nia mezeŭropa vivo estas iom pli kruda, ol la sveda, ĉar malgraŭ la tuj konstatebla krizo en tiu ĉi ĉarma lando la okuloj de la homoj

estas pli serenaj, la manoj pli malofte pugnigitaj kaj la koroj pli mildaj, ol en la aliaj partoj de Eŭropo. Oni devus vere plori, se eĉ tiu ĉi azilo de la homa boneco dezertiĝus sub la pereiga elspiro de la krizo. — En nia lando la kristnasko signifas la momenton, kiam oni retrovas sin, tempeton, kiam oni puriĝas kaj denove ekaŭdas melodion de la amo, kiun la ĉiutaga bruado dum la tuta jaro subpremis. La ĝenerala tono de nia familia festo estas iom kortuŝita, plena de impresoj, rememoroj kaj kun la amo kaj ĝojo aperas ankaŭ la ombro, la melankolio pro tiuj, kiuj ne povas kunfesti kaj la subkonscia timo de la estonto. — Se mi bone perceptis la esencon de la sveda kristnasko en la familioj, tiam oni povas diri, ke tiu festo havas alian karakteron, ĝia esenco estas la retrovo de la infaneco; infanhumoro regas eĉ tie, kie festas nur plenaĝuloj, kaj tiu reinfaniĝemo, aŭ eterna infaneco tre ofte karakterizas la reprezentantojn de tiu ĉi popolo, pri kiu neniu povas plenrajte diri, ke ĝi estas malvarma, rigida.

Sed vi ĉiam postulas de mi ion eksterordinaran, kelkfoje vi akuzas min, ke mi skribas nekredeblaĵojn. Iomete mi ankaŭ nun timas, ke vi ne kredas min, sed eble iam vi vizitos Svedlandon, — ankaŭ post la kongreso — kaj vi povos konvinkiĝi, ke mi ĉiam diras nur la plej veran veron.

Mi ankoraŭ ne parolis al vi pri la svedaj manĝaĵoj. Kiam mi alvenis tre rapide mi dekutimiĝis pri kelkaj hungaraj superstiĉoj koncerne la manĝaĵojn, ekz. mi eksciis, ke lardo, kukumo, frukto, post kiuj, aŭ kun kiuj oni trinkas lakton, kune absolute ne estas veneno ktp.

---

**KONGRESSEN!** För svenskarna medges kongressavgiftens inbetalning på två gånger om 10 kr.



— Do mi al kutimiĝis al la vere sanigaj svedaj manĝaĵoj, kaj mi estas sincera admiranto de la sveda »buterpantablo», kiu estas apartenaĵo de ĉiuj matenmanĝoj kaj kies varieco estas unu el la allogaĵoj de Svedlando. Vi ja povas mem elekti el dudekspecaj varmaj kaj malvarmaj manĝaĵoj, sin proponantaj antaŭ vi sur la longa tablo, sed tamen mi devas konfesi, ke estas kristnaska manĝaĵo, kiun, bedaŭrinde, neniam mi povos manĝi. Tio estas la tradicia kristnaska fiŝo, la t.n. »lutfisk». Se oni ekz. ĉiutage, kaj ne nur kristnaske, proponus al mi tiun manĝaĵon, certe mi malsatmortus, aŭ rapidege mi elmigrus el tiu lando, kiu cetere estus tre bedaŭrinda el mia vidpunkto. — Mi ja devas diri, ke la svedoj estas tradiciema popolo kaj tiu ĉi tradiciemo aperas ankaŭ en la manĝmaniero, pli forte, ol en nia lando, kie oni preskaŭ neniam festigas la aperon de iu aktuala manĝaĵo, kiu en Svedlando estas sufiĉe ofta. (Kankrofesto, anserofesto.) Laŭ mia supozo la lesiv-fiŝa (lutfisk) tradicio devenas el la ŝtonepoko, almenaŭ tion pruvas la suba recepto, sed kial filozofi, aŭskultu: Oni kaptas sufiĉe grandan fiŝon. La fiŝon oni sekigas. Poste oni metas ĝin en kalkon kaj sodon. Tie la malfeliĉa fiŝo forĝas sian originon dum kelkaj semajnoj. Kiam ĝi tute priforgesis ĝin, oni elprenas ĝin kaj dum kelkaj tagoj ĝi povas ĝui la akvon, kie ĝi iomete liberiĝas de la lesiv-aromo. Poste oni kuiras ĝin kaj donas al mi, sed malgraŭ la aserto de miaj tre ŝatataj svedaj geamikoj mi ne povas manĝi ĝin.

Sed rigardu, jam estas noktomezo kaj sur la strato, ho trompiĝo, la neĝsukero malaperis, restis nur kot-marmelado. Per tiu ĉi aktuala metaforo finas sian leteron via fidela nevo:

*Francisko.*



*Franska Deputeradeförsamlingen •läser Esperanto.*

Hr Lindhagen är ohjälpligt distanserad av en fransk kollega, hr M. Rolland, ledamot av deputeradekammaren i franska parlamentet. Hr Rolland har ej nöjt sig med att motionera om esperantos införande utan startat en esperantogrupp vartill 41 parlamentsledamöter av skilda politiska schatteringar anmält sig.

## 1 ĝis 100!

Nun ni komencas la publikigon de la aliĝintoj de la 26-a Universala Kongreso de Esperanto. Ĉi-tiun fojon ni el la amaso prenis nur la unuan centon. En venontan kaj venontajn numerojn ni iom post iom enpresigos la ceterajn centojn kaj milojn.

1. Frans Schoofs, Kleine Hondstraat 11, Antwerpen, Belgujo.
2. Henriette Schoofs, " " "
3. Felix Epstein, Hallerstrasse 72, Hamburg 13, Germanujo.
4. Elsa Jenckel, Mundsburgerdamm 53, Hamburg, Germanujo.
5. Elise Jacobs, Mathilden 9, Flensburg, Sleswig Holstein, Germanujo.
6. Paul Schwerin, Hohenzollernkorso 36 B, Berlin-Tempelhof, Germanujo.
7. Pierre Petit, de Neuilly 59, Rosny-sous-Bois, Seine, Francujo.
8. Josef Germann, Recklinghausen, Westfalen, Germanujo.
9. Martin Palsberg, Nyborggade 3, Aarhus, Jutland, Danujo.
10. Ellen Palsberg, " " "
11. Ludvig Martensen, Eilbeckerweg 203, Hamburg 23, Germanujo.
12. Frieda Martensen, " " "
13. Nils Olsson, Eriksgatan 9, Höör, Svedujo.
14. Olle Olsson, Arkivgatan 12, Lund, Svedujo.
15. Sam Jansson, Bergsvägen 41, Lidingö, Svedujo.
16. Jean Delor, Collège de garçons, Tlemcen, Dt. Oran, Algerujo.
17. Rollet de l' Isle, Rue du Sommerard 35, Paris 5:e, Francujo.
18. Helmi Josefson, Agnegatan 40, Stockholm, Svedujo.
19. H. Hansson, Sävstaholmsgatan 21, Malmö, Svedujo.
20. Clary Hansson, " " "
21. Oscar Bünemann, Isestrasse 79, Hamburg 37, Germanujo.
22. Friedrich Eilersiek, Wilms-strasse 5, Berlin SW 61, Germanujo.
23. Anna Elisabeth Frankamp, Batavierenweg 41, Nijmegen, Nederlando.
24. Edvin N. Wahl, Sverres gate 8, Drammen, Norvegujo.

---

**KONGRESSEN!** Insänd 10 kr. som första inbetalning av kongressavgiften.

25. Gunvor Wahl, Sverres gate 8, Drammen, Norvegujo.
26. Frances M. Bartholomew, Wilburg Road 154, Letchworth, Herts, Anglujo.
27. Helmi Dresen, Postkast 6, Tallinn, Estonio.
28. Arnold Bloemendal, Binnensingel 6, Deventer, Nederlando.
29. Elisabeth Bloemendal-Wisse, Binnensingel 6, Deventer, Nederlando.
30. Eileen de Burgh Daly, Casa Rustica, Bordighera, Italujo.
31. Ettore Aproso, Piani di Camporosso, Italujo.
32. Emilio Zanchin, Ercole Ferrario 7, Milano, Italujo.
33. Gottlieb Gawantka, Bismarckstrasse 66, Hamburg 30, Germanujo.
34. Julio Havas, Komárno, Ĉehoslovakujo.
35. Walter B. Currie, »Arldui», Stephenson street 6, Burnley, Lancashire, Anglujo.
36. Ida Zanchin, Ercole Ferrario 7, Milano, Italujo.
37. Algot Blid, Nynäshamn, Svedujo.
38. Valdemar Linder, Skeppargatan 77, Stockholm, Svedujo.
39. Georg Klefe, Untertrave 48/49, Lübeck, Germanujo.
40. Take Halma, Oranjedorp, Drente, Nederlando.
41. Kurt Schönrich, Walkmühlstr. 25, Wiesbaden, Germanujo.
42. Charlotte Ostertag, Grimmstrasse 11, Augsburg III, Bayern, Germanujo.
43. Erik Malmkvist, Drömstigen 14, Äppelviken, Svedujo.
44. August Höfer, Wilhelmstrasse 22, Chemnitz, Germanujo.
45. Erica Dietz, Rue du S:t Gothard 34, Strasbourg, Francujo.
46. J. J. M. Tetterode, »de Trekvogels» Berkelovid, Lochem, Nederlando.
47. S. W. Bloemendal, " " "
48. Maria C. Douwes, Niemo-Amsterdam, Drente, Nederlando.
49. Elisabeth Bünemann, Isestrasse 79, Hamburg 37, Germanujo.
50. Gustav Johannesen, Skappels gate 3, Hamar, Norvegujo.
51. Varma Thilander, Norevägen 12, Stocksund, Svedujo.
52. Harald Thilander, " " "
53. Lempi Järvenpää, Norevägen 12, Stocksund, Svedujo.
54. O. Jušen, Stokas iela 112, Riga, Latvio.
55. Carl Winberg, Bengtsfors, Svedujo.
56. Ida Winberg, " " "
57. Titti Winberg, " " "
58. Viktor Bonde, Box 202, Falun, Svedujo.
59. Hilding Johansson, Engelbrektsgatan 50, Falun, Svedujo.
60. Albert Lindström, Kristinegatan 23, Falun, Svedujo.
61. Faina Gutmann, Kaupmehe 6—1, Tallinn, Estonio.
62. Vera Gutmann, " " "
63. Helene Gutmann " " "
64. Robert Gutmann, " " "
65. Gabriele Peterson, Kaasani 15—4, Tallinn, Estonio.
66. Irina Burcev, Tatari 21b—5, Tallinn, Estonio.
67. Agnes Nii, Harju 43, Tallinn, Estonio.
68. Wanda Nummelin, Jakobsoni 38—3, Tallinn, Estonio.
69. Esther Nilssen, Munkedamsvei 1, Oslo, Norvegujo.
70. Aagot Stetteröd, Trollsvingen 5, Ullevål-haveby, Norvegujo.
71. O. Br. Sletteröd " " "
72. Leono Schoofs, Kleine Hondstraat 2, Antwerpen, Belgujo.
73. Robert Robertsson, Alexandra Park Road 228, London N. 22, Anglujo.
74. Rosa Bye, Waldemar Thranes 61, Oslo, Norvegujo.
75. Edith Stray, Josefinegate 15, Oslo, Norvegujo.
76. Jakob Rosenberg, Hollandi 11—4, Tallinn, Estonio.
77. Adele Tomingas, Öne 7—8, Tallinn, Estonio.
78. Evy Sildever, Villardi 26—5, Tallinn, Estonio.
79. Mimi Cahen, Hildeboldplatz 21, Köln, Germanujo.
80. Vincenzo Musello, via Palasciano 17, Napoli, Italujo.
81. Agostino Stellacci, Vicoletto Trinità Spagnoli 3, Napoli, Italujo.
82. Elisabet Olsson, Tulegatan 43, Stockholm, Svedujo.
83. Charles Le Séac'h, Pont-l'Abbé, Finistère, Francujo.
84. E. Marcou, Hessestrasse 1, Potsdam, Germanujo.
85. Sune W. Ahlm, Kanongatan 673, Karlskoga, Svedujo.

**VARJE MEDLEM** i S.E.F. erhåller även U.E.A:s internationella medlemskort.



86. Juan Barcelo Andreu Jose Villalonga 45, Palma de Mallorca, Hispanujo.
87. Franz Hub, Friedhofstrasse 14, Gablonz a N., Böhmen, Ĉeĥoslovakio.
88. Ivar Johansson, Mellangatan 9, Göteborg, Svedujo.
89. Eilif Hellen-Schei, Elgeseter gate 37, Trondheim, Norvegujo.
90. Ed. Jung, quai Finkmatt 1, Strasbourg, Francujo.
91. Anna Jung,
92. Elli Ahlström, Strandvägen 5 B, Stockholm, Svedujo.
93. Aira Jalava, Mariankatu 17 A, Helsinki, Finnlando.
94. Gösta Bohm, Fruvik, Svedujo.
95. Felicie Staes-Vandervoorde, Avenue de la liberté 11, Koekelberg-Bruxelles, Belgujo.
96. Elly Staes, Avenue de la liberté 11, Koekelberg-Bruxelles, Belgujo.
97. G. H. Mooij, Teunisbloemlaan 19, Den Haag, Nederlando.
98. Konrad Persson, Lindö, Arkösund, Svedujo.
99. Iris Woxberg, Hudiksvall, Svedujo.
100. Agnes G. Macfarlane, Dumbarton Road 314, Glasgow W I, Skotlando.
- Laŭlande: Algerujo 1, Anglujo 3, Belgujo 5, Ĉeĥoslovakujo 2, Danujo 2, Estonujo 12, Finujo 1, Francujo 6, Germanujo 17, Hispanujo 1, Italujo 6, Latvujo 1, Nederlando 8, Norvegujo 9, Skotlando 1, Svedujo 25 = 100.



#### Engelsk stad anordnar kurser i Esperanto.

I allt vidare utsträckning vinner esperanto myndigheternas gehör. Sålunda ha skolmyndigheterna i Southendon-Sea beslutat att i kursplanen för Evening Commercial Institute införa tvenne kurser i esperanto, en för nybörjare och en fortsättningskurs. Staden har gjort betydande reklam för kurserna.

I S:t Gallen i Schweiz undervisar man också i esperanto vid en därvarande flickskola, »Talhof», som redan två gånger förut anordnat liknande kurser.

Vid skolorna i departementen Seine, Allier Hautes Alpes, Bouche-du-Rhône och Marne i Frankrike har esperanto blivit tillåtet som frivilligt läroämne.

I samband härmed kan även nämnas, att polska ministeriet för uppfostran har uttalat sitt gillande av en av professor M. Sygnarski i Bydgoszcz utarbetar lärobok i esperanto.

## Rezolucio por vere internacia Esperanto.

Unuanime akceptita de la 21a Japana Esperanto-Kongreso en Kioto, la 3an de novembro 1933.

»La 21a Japana Esperanto-Kongreso atentigas pri la reformemo kaj troa neologismemo de »modernaj» esperantistoj, kiuj konstante malfaciligas nian internacian lingvon. Tro ofte oni ne atentigas nin orientanojn ĉe la enkonduko de »internaciaj vortoj», kiuj ne estas komprenataj en la Oriento, same kiel en multaj eŭropaj landoj.

Nia majstro Zamenhof neniam parolis pri Esperanto kiel »la eŭropa lingvo» sed ĉiam kiel la lingvo »de l' tuta homaro». La japana Esperantistaro konstatas, ke se la opinio pri Esperanto kiel »la eŭropa lingvo» estus alprenata de la plimulto de niaj eŭropaj samideanoj, la disvastiĝo de nia lingvo en la Oriento estus grave endanĝerigata.

Konsiderante tiun ĉi aferstaton, la 21a Japana Esperanto-Kongreso deklaras, ke

1) La vortfarado per afiksoj kaj kunmetado estas unu e' la esencaj karakterizoj de Esperanto; ĝi estas grava plifaciligado de la lernado.

2) La esenco de la lingvo mem kuŝas en ĝia manifestado, kiu realiĝas ĉefe per la literaturo, konsekvence, fako speciale nomata »literatura», en Esperanto ne povas ekzisti kaj oni ne povas formi ian fakan vortaron literaturan, kiel ekz. maŝinfakan, medicinan, aŭ alian terminaron. Tion ĉi ni asertas spite al la sofismoj de anoj de la tielnomata »literatura fako».

3) Neologismoj pro bezono de poemfabrikado estas nenio alia ol la degenerado de la arto poezia; plie, en Esperanto ĝi signifas rekte danĝeran ludon kontraŭ la Fundamento.

Konsiderante, ke ni ekstrem-orientanoj povas fari pli objektivan juĝon pri la internacieco ol la eŭropanoj kies lingvoj estas tro proksimaj al Esperanto kaj gardi severan senpartiecon kaj neŭtralecon, ni, kunvenintaj en la Laborkunsido

---

**KONGRESSEN!** Kongressdeltagarna få gratis teater, konsert, bal, kongresshandlingar o.s.v.

de la 21a Japana Esperanto Kongreso en Kioto, energie malrekomendas, pro la bono de nia lingvo, la uzon de neologismoj sen nuanca diferenco aŭ kun perforta nuancigo.

Ni vokas al niaj samideanoj en la Okcidento: la epoko de eŭropa aŭ ali-kontinenta idea imperialismo jam definitive pasis. Vivu la tuthomara solidareco kaj la inter-kontinenta lingvo Esperanto! Vivu ankaŭ la egaleco de rajtoj de ĉiuj popoloj ankaŭ sur la lingva kampo internacia!»

\*

Al ni ŝajnas ke tiu rezolucio ne venis eĉ unu tagon tro frue!

## Grava perdo por la esperantistaro.

Felikso Zamenhof, frato de nia majstro, mortis en Varsovio la 4-an de decembro lasta, 65-jara — li estis naskita la 6-an de nov. 1868. Estante la unua esperantisto krom la majstro mem, li multe helpis sian pli aĝan fraton por diskonigi lian verkon. Kaj en la postmilitaj universalaj kongresoj oni aŭskultis kun emocio la tradician Zamenhofan oratorojon, kiun li faris — ne kiel sia granda frato en la komenco de la kongreso, sed en la ferma kunsido, ĉiam por inspiri al ĉiuj esperantistoj pacajn sentojn kaj konkordan laboron. Felikso Zamenhof estis apotekisto en Varsovio, bonvola kaj bonfara homo, kiu ŝatis infanojn ŝatata de ili. La esperantistaro sincere lin funebrias.

PNn.

\*

La 18an de dec. 1933 mortis apud Parizo post longa malsano Prof. *Grosjean-Maupin* en la aĝo de 66 jaroj. Li estis membro de la Esperantista Akademio.

De styrande i departementet Basses-Alpes, Frankrike, ha beslutat införa esperantoundervisning i skolorna inom departementet.

**KONGRESSEN** kommer att filmas!

## SVEDA KRONIKO

**AGNESBERG.** Post sukcesplena kurso de s-ino Seppik, 28.11. fondiĝis klubo, kiu ricevis la nomon »La nova tempo». Oni elektis la jenan estraron: Allan Jönsson, prez.; John Andersson, vicprez.; Gustav Hast, sekr.; Kurt Lindström, kas. Aliĝis 12 membroj.

Multaj el la anoj ĉi tie estas senlaboraj kaj pro tio la klubo decidis libervolan aliĝon al la federacioj.

*Seppinido.*

**AGNÄS.** 12.11. Post parolado kaj Csehmetoda provleciono de s-ro Hans Fox el Danzig sin anoncis tuj 16 pers., kaj kurso komencis. Partoprenas nun 21 p., inter ili 3 geinstr.

**GNARP.** Fondita Esperanta studrondo por komencantoj. Gvidas Ragnar Westrin 12 gekursanojn. *V. L. T.*

**HALLSBERG.** Bonegan rezulton povas elmontri la kursoj de s-ro T. Morariu. Al elementa kurso okt. sin anoncis ne malpli ol 51 partoprenantoj kaj ĉiuj ankoraŭ restas. Krom tiu kurso red. Morariu ankaŭ gvidas alian por progresintoj, kiu laboras kiel studrondo de ABF (Laborista Kleriga Asocio) kaj nombrias kvindek da interesuloj.

**JÖNKÖPING.** 10.12. pasintjare la klubo aranĝis feston. Ĉeestis ankaŭ klubanoj el Huskvarna kaj Hovslätt. Festparolis la sekretario, kaj paroladetis la ĉarma s-ino Seppik, vestita en estona popolkostumo, tre interese kaj amuze. Tri samideanoj el Huskvarna ludis teatraĵeton, la klubanoj en Hovslätt kantis, kaj s-ro Seppik ĉerce parolis pri »Jönköping—Grönköping». Deklamado de Bror Svensson kaj kantado de la plej juna knabino el la kurso de s-ro Jensie en Huskvarna. Entute bonega aranĝo. »Gesepik» prenis ĉies koron. Ĉeestis proksimume 100 geinteresuloj.

*»La aparato».*

**KUNGSLENA.** 9.12. Vizitis nin s-ino Erika Seppik kaj faris lumbildan paroladon pri sia hejmlando antaŭ plenplena salono.





*La elementa kurso de T. Morariu en Hallsberg.*

*En la mezo maldekstre Morariu kaj dekstre la kluba prez. J. V. Gustafsson.*

**LINKÖPING.** »La Internacia Stelo» kunvenis 17.12. por festi la tagon de Zamenhof. S-roj Albert Rois el Wien kaj Fritz Resche el Chemnitz donis al la festo la veran senton de internacieco. Partoprenis ankaŭ s-anoj el Mjölby, Motala kaj Mantorp. Tri Mjölbyanoj bone prizorgis la muzikan parton, f-ino H. Grahn, Linköping, parolis elokvente pri Zamenhof, s-ro D. Klasson, Mantorp, rakontis pri travivaĵoj dum bicikla veturado, s-ro A. Rois parolis pri la unueco, por kiu ĉiu vera esperantisto laboru kaj s-ro F. Resche parolis iomete esperante kaj poste germane, tradukis esperanten s-ro Rois. Krom la paroladoj prezentis anoj el la klubo vivantan rebuson en Esperanto. *H. Z.*

**LUND.** 12.12. Lunda Esperantoklubo havis tre ĝojan Lucia-feston kun riĉa programo: Prelego de la prez. pri »La tago de la libro», Viva Gazeto kun intervjuoj de diversaj membroj pri la temo »Kiel mi fariĝis esperantisto», skribite kiel ekzerco en la daŭriga kurso. La v. prez. parolis pri la internaciaj vortoj de Esperanto montrante ke nia lingvo ne estas »artefarita» (afekta, stranga); kontraŭe ĝi estas artaĵo. La plej grandan sukceson faris Lucia kun la akompanantaj virgulinoj kaj »la bakista knabo», kiuj regalis la ĉeestantojn per kanto, kafo kaj kukoj. Tre festa ankaŭ estis »Aftonklockorna» plane ludita de s-ino Ek — flegistinoj ĉe la malsanulejo S:t Lars parte aranĝis la bonegan feston, kiun pli ol 40 p. ĉeestis. *El. Lo.*

**NORDMALING.** 8.11. provlecionon en la

lernejo por la infanoj, la 6.11. publika provleciono. La 8.11. komencis Csehmetoda kurso kun 15 partop. (2 instruistoj). Neniam antaŭe estis eble interesi la vilaĝanojn ĉi tie por iu ajn studlaboro. Nun nia instruisto Hans Fox el Danzig venkis per kaj por Esperanto.

**SLITE.** 1.12. finiĝis la kurso, kiu estis gvidata de la pola instruisto Schuldenfrei. Ni decidis aranĝi pli poste komunan ekzamenon kune kun Roma kaj Visby. En la kurso partoprenis 15 personoj, kiuj nun daŭrigos kune en studrondo. *H. O.*

**SLÖINGE.** 28.11. La Esperanta klubo de Slöinge havis sian monatan kunvenon kaj je la noktmezo ĝi havis la afablan okazon honorigi sian prezidanton, s-ro J A. Nord, kiu tiam eniĝis en sian 50-jaron. Sian dankemon al li por lia granda energia laborado por Esperanto la klubo montris transdonante esperantan tabloflagon.

En dec. la klubo por komencantoj sub gvido de s-ro Nord komencis sian laboron. Ni povas noti, ke en la najbara komunumo Effra nova studrondo de esperanto ĉi-aŭtune fondiĝis.

*Eiro.*

**STOCKHOLM.** 11.10. Ĉar la kursoj de d-ro Szilágyi en tiuj tagoj finiĝis pro lia forveturo al Lidköping, okazis malgranda finfesto en la klubo, kiam la gelern-

---

**KOM IHĜ** esperanto i Edert testamente!

intoj per paroladetoj dankis al sia instruisto, kiu ankaŭ ricevis florojn. Plej grandan sukceson faris fraŭlino el kurso ĉe la granda firmo Paul U. Bergström, kiu, spite al tio, ke ŝi studis dum tre mallonga tempo, montriĝis vera parolantino en nia lingvo. — 18.10. S-ro Julin raportis pri kurso por trafikoficistoj, kiuj havas 22 gelerantojn. Krome aperis vigla numero de la »Viva Gazeto«. — 25.10. La teatra grupo prezentis: »La malgranda operacio«, dramo de Gunhild Berg, kaj »La bagatelo«, farso de Sigv. Håkansson. — 1.11. Parolis rektoro Jansson pri studkunveno en Göteborg, kiun li vizitis, kaj s-ro Nils Olsson el Höör pri vojaĝo en Danujo kaj vizito en la dana urbo Silkeborg. La paroladon ilustris belaj lumbildoj. S.H-son.

8.11. Reklamis la prezidanto la gazeton »Vårt Hem«, kiu enpresis esperantan krucvortenigmon. La unuan premion gajnis nia lerta tradukanto Birger Gerdman. Estis prezentata la teatraĵo »La rivaloj«, komedio en du aktoj de Sigvard Håkansson. En unu el la ĉefroloj ludis nia hinda amiko Lakshmiswar Sinha, kiu ankaŭ kantis belajn, strangajn bengalajn kantojn. — 15.11. La unua punkto estis bela muzika prezentado de f-inoj Ekelundh kaj Heimer. Poste s-ino Julin diris kelkajn vortojn pri Selma Lagerlöf okaze de ŝia 75-jara naskotago. — 22.11. S-ro Hedgren laŭtlegis propran tradukon »La koboldo en Töreby« de Selma Lagerlöf. — 29.11 S-ro Nilsson parolis tre interese pri la origino de l' homo. Krom tio s-ro Severin amuze parolis pri la mallonga vivo de cigaredo. — 6. 12. Sigvard Håkansson lŭtlegis propran verkaĵon, »Miro« kaj E. Malmkvist laŭtlegis el »Prozo Ridetanta«. 13.12 Okazis granda Luĉiofesteno kun kantado, deklamado, dancado ktp. Pro la sukcesa vespero respondecis H. Blom, kiu dum ĉiu kunveno afable donas al ni pruvojn pri sia lerteco en la muzika arto. — 20.12. Kristnaska festeno al kiu ĉiu membro portis donacon, kiu valoris 25 oerojn. La koboldo poste disdonis la donacojn. Dancado ĉirkaŭ la kristnaska arbo finis la kunvenon. — 28.12 Parolis d-ro Szilágyi pri sia estado en Lidköping kaj muzikis s-ro Blom kaj s-ro

Eriksson, kiu dum la kunvenoj per sia violono majstre akompanas la pianludadon de s-ro Blom. — 3.1 S-ro Julin parolis pri la nuna esperanta gazetaro kaj s-ro Szitrom tre amuze parolis pri siaj impresoj en Svedujo.

*La sekretario.*

**SÖDERFORS.** 15.10. komenciĝis ĉi tie la unua esperanta kurso kun 18 partoprenantoj. Granda intereso. Gvidanto s-ro Gösta Eriksson el Tierp.

**SÖDERTÄLJE.** *Societo Esperantista de Södertälje »Progresado»:* 3.9. S-ro S. Håkansson, iama membro de »Progresado«, kune kun kelkaj gesam. el Stockholm prezentis en bonega maniero kelkajn teatraĵojn. Poste okazis en »Sans Souci« festeneto. — 25.9. D-ro Szilágyi el Budapeŝto faris publikan, tre interesan lumbildparoladon pri sia hejmlando. Lerte interpretis s-ro S. Håkansson.. — En la aŭtuno »Progresado« en kunlaboro kun Laborista Esp. Klubo kaj ABF faris propagandon por novaj kursoj. En okt. komenciĝis du novaj kursoj, unu kun 35, la alia kun 19 membroj. Instruisto estas s-roj Henning Larsson kaj Erik Grahn. Krom tio okazas ĉiusemajne »konversaciaj vesperoj« por progresintoj. *Abio.*

**TIERP.** 24.10. la Esperantoklubo ĉi tie en nia popollernejo komencis kurson por komencantoj laŭ la rekta metodo. La daŭrigan kurson ni komencis la 18-an de okt. Partoprenas 10 interesuloj. Instruisto por ambaŭ kursoj estas Gösta Eriksson.

**ÖREBRO.** 16.12. 1933 okazis kursfiniĝa festeno en la restoracio City, por la partoprenintoj de la komenca kurso, kiun gvidis s-ro Tiberio Morariu. Dum la festeno okazis kanto, deklamado kaj esperantan dialogon. Al -s-ro Morariu ĉi transdonis monsumon kiel memoraĵo. Sekvis vespermanĝo kaj dancado. Ĉirkaŭ 50 personoj ĉeestis la agrablan festenon. *G. B.*



*Esperanto i tjänst hos turistförening.*

Centralstyrelsen för Portugals Turistförening har vid sammanträde beslutat att inom styrelsen upprätta en esperantosektion med uppgift att handlägga esperantopropagandan, som hädanefter skulle få en mera officiell prägel.

**TILL** Universala Esperanto-Asociosker numera anslutning genom Svenska Esperanto-Förbundet.



# Klubbstudieledaren.

Varje esperantoklubb med självaktning håller sig med en studieledare. Valet av en sådan är lika viktigt som t. ex. val av klubbordförande. Låt oss då gå ifrån mångsyssleriet inom klubbarna. Specialutbildning är att föredraga. Resultatet blir vida bättre, om ledningen för varje sektion i klubbarbetet handhaves av en medlem, som ägnar sig helt och hållet åt en uppgift. Lasta aldrig så mycket på en duktig och arbetsvillig medlem, att hans närvaro blir en absolut fordran för att det överhuvud skall bli något av. Fördela uppgifterna, och sök att få alla med och hjälpa till att dra lasset.

Studieledaresysslan får inte nonchaleras, så att vem som helst väljes, bara för att man hastigt och lustigt ska komma ifrån ett tråkigt val. Jag vet, att det finns de, som resonera som så, att studieledare kan vem som helst vara, ty hans uppgift är egentligen inte annat än att ta upp anmälningar på dem, som vilja delta i studiecirkel. När studiearbetet väl är igång, så är hans uppgift fylld, menar han, och under sommaren ligger han i ide i avvaktan på höstsäsongens start.

Må vi ta oss ur sådana fördärvbringande vanföreställningar, om vi till äventyrs skulle vara fångna i dem. Ty det är i realiteten så, att klubbstudieledarebefattningen är, om inte den allra förnämsta, så i alla fall en av de mest betydande posterna i klubben.

Fördenskull måste den, som bekläder den posten, ha vissa kvalifikationer. Om det är möjligt naturligtvis. Främst ska han vara en intresserad esperantist och energisk propagandist. Han är det ständigt vakande ögat och skall gripa varje tillfälle att få fram esperanto. Hans uppgift är tvåfaldig: han verkar dels *inåt* och dels *utåt*. Vi skulle kunna kalla honom klubbens esperantosamvete, som alltid gör sig påmint, då esperanto icke får stå i förgrunden utan tränges åt sidan av andra intressen eller slöhet, som fallet är ibland.

Klubbstudieledaren har självfallet sin främsta uppgift i att övervaka, att studiearbete bedrives, och att det bedrives på ett ändamålsenligt sätt. Han skall inom styrelsen se till, att studiefrågan tages upp i god tid, innan hösten kommer, och att detaljerade förslag om

höstpropagandan, nybörjare- och fortsättningskurser utarbetas och ligga fullt klara, då studielampan ska tändas.

Han behöver inte själv stå som cirkel- eller kursledare, om han kan få kompetenta medhjälpare. Sådana bör han alltid försöka skaffa sig. Men det åligger honom att kontrollera, att cirklar och kurser fungera på ett tillfredsställande sätt.

Och så en synnerligen viktig sak. Studieledaren må också se till, att nybörjarcirkelarnas deltagare vid studietidens slut komma med i platsens esperantoförening, eller bilda en förening, om nu så är, att kursen försiggår på en plats, där esperanto ej förut haft organiserade anhängare. På så sätt bidrager studieledaren organisatoriskt till esperantos framgång.

Han bör icke heller glömma att, innan nybörjarna skingrats, träda i förbindelse med Svenska Esperanto-Institutet och därifrån erhålla bestämmelser angående examen och anordna en sådan. Man skulle kunna säga, att studieledaren är Institutets representant och alltså tillvaratager dess intressen.

Institutet vill också ha rapporter från studiefältet. Det är ju ingalunda betydelselöst, om de cirklar och kurser, som komma igång, rapporteras eller ej. Statistikern har sin stora betydelse. Studieledaren ser till, att Institutet hålles å jour och kan registrera esperantoverksamheten.

*Inåt* är som sagt klubbstudieledaren »väktaren på muren». Hans intresse är knutet till biblioteket. Vi ha nu kommit så långt i utvecklingen, att biblioteksfrågan måste ägnas största uppmärksamhet. Särskilt i tider av penningknapphet så är det av vikt, att organisationerna i så stor utsträckning som möjligt söka tillfredsställa det läsbehov, som medlemmarna ha. Solidaritet stärker och binder. I klubben ska man känna, att mottot är: En för alla, alla för en och alla för esperanto.

Intet möte utan något esperanto, må det vara våra klubbars motto. Studieledaren ordnar med detta. Han ser till, att Lingva kvaronhoro inte glömmas bort, rekommenderar lämpliga böcker att läsa högt ur och följer med esperantorörelsen i dess utveckling, så att han

vid lämpliga tillfällen har möjlighet att meddela värdefulla nyheter.

Översättningen från esperanto till god svenska bör övas. Även härvidlag kan klubbstudieledaren vara till stor nytta. Genom att han själv eller klubben prenumererar på en eller flera esperantotidningar, har han möjlighet att få tag i kortare berättelser och annat. Detta låter han klubbmedlemmarna översätta. Kanske kan man rent av ha nytta av, att inom klubben bildas en översättningscirkel, som tar som sin uppgift att göra översättningar från esperanto till svenska och tvärtom. Översättningarna sändas till tidningar, som i allmänhet med nöje publicera dem. Eller också lägges översättningarna i arkivet och kunna vid lämpliga tillfällen användas som propagandapunkter, högläsas och tolkas.

*Utåt* är studieledaren klubbens representant i den samlade studieverksamheten. Vi ha många organisationer i Sverige, inom vilka ett välorganiserat och föredömligt studiearbete bedrives. Vi ha ABF, SSU, SLU, JUF, IOGT, NTO, SUG, Heimdal, Blå Bandet m. fl. Inom dessa organisationer är frågan: Vad ska vi studera? vid varje säsongs början brännande. Ingen av organisationerna är motståndare till den tanke, som esperanto symboliserar. Finge vi på varje plats studieledare, som inom respektive organisationer förde fram esperanto, hänvisade till cirkelmateriel, hjälpte till att göra starten av en esperanto-cirkel så lätt som möjligt etc. så skulle vi se, hurusom antalet cirklar i esperanto skulle stiga i höjden. Ty det är faktiskt så, att på många håll är man intresserad av esperanto, men då det inte finns någon, som förklarar och hjälper på traven, så vågar man sig inte på. Just härvidlag ha våra klubbstudieledare en stor roll att spela. Passa bara på.

Detta är några synpunkter på studieledarefrågan, vilka böra beaktas. Valet av en riksstudieledare, som alltså speciellt ägnar sig åt denna sida av SEF:s verksamhet, gjordes i den känslan, att allt måste göras för att organisera studieintresset och få en effektivare både kontroll och propaganda. Men det är all anledning att minnas, att detta val blir ett slag i luften, ifall inte det ute i klubbarna finns ett verkligt intresse för studiefrågan, och om det inte överallt finns klubbstudieledare till hands, som stå i livligaste kontakt med riksstudieledningen, klubben och folket i hemorten.

Här gäller som alltid, att det är de många enskilda insatserna, utförda av intresse, målmedvetet och rationellt, som gemensamt forma det goda slutresultatet. Det beror på oss alla, var vi än verka. Det är inte fråga om, *vad* vi ska göra, och *hur* vi göra eller *om* vi kan utan *att* vi kunna, *att* vi vilja och *att* vi handla.

Einar Dahl.



### *La Leipzig-a Foiro.*

Du fojojn en ĉiu jaro, komence de Marto kaj fine de Aŭgusto, en la malnova foirurbo Leipzig kunvenas 120.000 ĝis 160.000 aĉetantoj el la tuta mondo (por koniĝi ĉi tie la produktojn de ĉiuj landoj kaj por aĉeti). Rondcifere 8.000 firmoj en ĉiu foiro ekspozicias siajn produktaĵojn. En konsidero al la nombro de la ekspoziciantoj kaj de la aĉetantoj, en konsidero ankaŭ de l' amplekso de la okazanta vardebato la Leipzig-a Foiro estas la plej granda foiro de la tuta mondo kaj ankaŭ la plej eminenta merkato de la mondo, do, unu el la plej gravaj institucioj de l' internacia komerco.

Ankaŭ la venonta Leipzig-a Printempa Foiro, kiu okazos de la 4a ĝis 11a de Marto 1934, tre verŝajne estos vizitata de aĉetantoj el pli ol 50 landoj de la mondo, tiel ke ĉiu aĉetanto povos koniĝi objektivite kaj precipe ankaŭ komplete kun la tuto de l' varofertoj de la mondproduktado. La foiro uzas Esperanton en sia propagando.

### *Radio Eiffel Turo,*

1445 m. La ĉiusabata esperanta dissendo pri Turismo en Francujo okazos de nun unu horo pli malfrue, tio estas de 15a45 ĝis 16 laŭ franca vintra horo (16a45 laŭ MET).

### *Gåvor till propagandafonden:*

Otto A. Nilsson, Malmö	1:—
A. Höglund, Boden	5:—
A. Soneson, Strömsnäsbruk	10:—
K. R. Agge, Sthlm	5:—
A. Rosén, Vilhelmina	1:—

# De Anglujo al Svedujo.

Ferivojaĝo per Esperanto.

En la somero 1933 mi pasigis mian feritempon en Svedio, vizitante mian tian korespondanton s-ro Fredin en Bjuv, kaj miaj spertoj dum tiu vizito estas, ke eksterlandaj vojaĝoj povas esti tre ĝuindaj kiam oni uzas Esperanton.

Meze de Junio mi ekveturis de Leeds al la havenurbo Hull, kie mi enŝipiĝis por la veturado al la unua celo Kopenhago. Tiu parto de la veturado okupis pli ol 50 horojn, okaze de nebulo la ŝipo devis malpliigi la kutiman rapidecon. Alvenante en Kopenhagon mi unuafoje en la vivo ekvidis fremdlandon, ĉar neniam antaŭe mi havis bonŝancon alilanden veturi. Je la oka matene mia sveda amiko atendis min ĉe la kajo de la ŝipo, kaj post emocia reciproka saluto ni iris al la fervojstacio, de kie ni vojaĝis per trajno al Helsingör.

Nun mi devis diligente uzi nian internacian lingvon, ĉar mi ne scipovis eĉ unu vorton de la sveda lingvo kaj same mia amiko ne sciis ion de la angla, tial nia sola interkomprenilo estis Esperanto, kiu bonege funkciis dum la tuta tempo. Post duhora veturado per rapidtrajno ni troviĝis en Helsingör, la pordego al Svedujo, kaj per pramo ni tre baldaŭ povis saluti la belan urbon Hälsingborg. »La perlo de la markolo», kie nin bonvensalutis aro da afablaj gesamideanoj. Inter ili ni pasigis gajplenon horon antaŭ ol la vagonaro transportis nin al la fina celo de mia vojaĝo, Bjuv. Ĉi tie mi estis bonvensalutata de la gehejmanoj de mia korespondanto, ne kiel fremdlandano, sed kiel mi estus ano de la familio, kaj ili ĉiuj faris ĉion por ke mi sentu min kiel hejme, kaj vere mi preskaŭ ne povis imagi ke mi estis en fremda lando, se mi ne estis aŭdanta la fremdan lingvon parolatan de la gepatroj.

Dimanĉe la 18-an mi havis bonŝancon paroladi en la radio de Hälsingborg pri la temo »Esperanto en Anglujo» kaj post tio mi rigardis la urbon sub majstragvidado de niaj tieaj gesamideanoj. Laŭ mia juĝo, tiu urbo estas eksterordinare bela, kun tre bela situo sur deklivaj altajoj kaj rigardanta al la maro kaj malproksime oni vidas la danan landon. Notinda estas la pureco de la tuta urbo, kaj la multaj parkoj kelkloke abruptas la ku-

timan enuecon de la stratoj. Mi speciale volas mencii viziton en la bela nova koncertdomo, tre laŭmoda ĝia aspekto estas, kaj interne oni rimarkas multajn arkitekturajn novaĵojn. Neforgesebla al mi estas la vizito en la turon »Kärnan», restaĵo de malnova urba fortikaĵo, de ĝia 30 metrojn alta supro oni havas ĉarman elrigardon de la ĉirkaŭaĵo.

La postan tagon la veturado direktiĝis al la »Norda Sorrento», Båstad. Ĉi tie geonkloj de mia amiko kore bonvenigis min, kaj en tiu ĉi belega parto de la mondo mi ĝuis neforgeseblajn tagojn. Sendube Båstad havas unikan belecon, unuflanke stariĝas altaj arbvestitaj deklivoj, kaj turniĝante la kapon aliflanken oni vidas la golfeton de Laholm. Ankaŭ la ĉirkaŭaĵo de Båstad tre ĉarma estas, neniam antaŭe mi vidis tian naturbelecon. Unu vesperon ni faris aŭtomobilan ekskurson al la apudaj regionoj kaj la impresoj de tio estas al mi memorinda. Por mi anglo estis tre neordinare vidi tiom da densaj arbaroj, kiuj tute forestas en mia lando, kaj la ruĝaj dometoj kun blankaj fenestroj, ankaŭ plibeligis la vidaĵon. Haltigante en la arbaro mi unuafoje aŭskultis la kanton de najtingalo.


La du memorplenaj tagoj en Båstad forpasis kaj la 20-an de junio vespere ni alvenis al la loko Billesholm kie la Esp-klubo aranĝis kunvenon, je kiu mi prelegis pri la laborado de la anglaj esp-kluboj.

La faman katedral- kaj universitaturbon Lund ni vizitis la tagon poste. El la vizititaj aferoj tie estas la katedralo kun ĝia stranga malnova horloĝo, la botanika ĝardeno, kaj la monumento, memoro de la batalo inter la svedoj kaj danoj. En Lund mi manĝis la svedan »Knäckebröd» la unuan fojon, kaj ĝi tre plaĉis al mi, sekve post mia hejmenveno mi faris peton pri »Knäckebröd». La patrino serĉis ĝin en butikoj post butikoj, kaj fine ŝi trovis butiketon kie ĝi estas vendata, mi tre feliĉa fariĝis pro tio, kaj nun multaj el miaj parencoj kaj gekonatoj aĉetas »Knäckebröd», do dank' al Esperanto cente la svedaj »Knäckebröd»-fabrikantoj nuntempe pliigis la vendosumon.

Unu semajno tre rapide forpasis kaj la 22-an mia lasta tago en Svedlando venis. Antaŭ mia ekveturo mi havis okazon vidi la fabrikadon de brikoj en la fabriko en Bjuv. Posttagmeze alvenis



la tago kiam mi bedaŭrinde devis enpaki miajn havaĵojn kaj multajn memorajojn de feliĉaj tagoj, kiuj forpasis tro rapide. Do, mi adiaŭis la bonkorajn gehejmanojn de mia amiko kaj ekveturis denove al Kopenhago kie la ŝipo al mia hejmlando atendas. Mi antaŭe diris ke Esperanto bonege funkciis dum la tuta tempo, sed revenante okazis io, kio kontraŭas tiun diron. Kiam mi kaj mia amiko estis elirontaj de la pramo en Helsingör mia dikega valizo neatendite malfermiĝis kaj la tuta enhavo eliris ĝin, tiam mi nekonscie malbenis la valizon, ne en Esperanto sed en angla lingvo, kaj mia amiko strange rigardis min, nekompreninte min.



*Mi kaj mia amiko en la botanika ĝardeno de Lund.*

La vesperon kaj la nokton ni pasigis en Kopenhago kie mi vidis parton de la Londone similan urbegon, kaj peraŭtomobile ni rigardis la ĉirkaŭaĵon. Alveninte la ŝipon la postan matenon, nur restis la adiaŭo de mia bona amiko kiu akompanis min de la momento de mia alveno en Danlandon ĝis la forira tempo. Kaj nun nur restis la hejmenveturado, kaj mia ĝis nun la plej ĝuinda ferio finiĝis kaj mia espero estas ke mi iam denove povas renkonti miajn ĉarmajn kaj bonkorajn svedajn amikojn.

Fine, mi povas aserti ke Esperanto estas tre ideala helplingvo por eksterlandaj vojaĝoj, kaj ĉiam ĝi bone funkcias por ebligi la komprenadon inter ni nesamnacianoj. Se mi iam denove povos vojaĝi alilanden Esperanto estos *mia lingvo*.

Korsalutojn al ĉiuj gesamideanoj, kiujn mi renkontis.

*Fred Cornell  
York, Anglujo.*

## La leŭtenanto de l' urbo.

De Gustav Fröding.

*Ho jen, kiu venas ĉevale al ni!  
Ho kia pomprajdanto,  
jen rajdas leŭtenanto,  
Rigardas servistinoj,  
fenestre sinjorinoj.  
Rajdanto ja venas kiel princo al ni.  
Ho Dio, kiel bele sin vestis li!*

*Jen brilas la suno sur lia rajdad'.  
La botoj, ili brilas  
al gemoj similas.  
Li estas rekta, lia  
talio tre gracia,  
la jako laŭmoda al fest' kaj parad'.  
Rigardu vi, rigardu vi per senĉesa rigardad'.*

*Ridetas li milde kaj pastre al ni,  
lipharojn tordetas,  
ĉapelon demetas  
salute al virinoj,  
»fenestro-belulinoj»,  
kaj ĉarme li venas kiel princo al ni.  
Ho Dio, kiel bele sin vestis li!*

Traduko de Alfred Lindkvist.



## Unua komuniko de la Esperanto-sekcio ĉe pola Touring-klubo.

La Pola Touring-Klubo en Varzawa — konsiderinte la disvolviĝon de Esperanto kaj taksinte ĝian valoron por propagando de turismo — fondis Esperantan Sekcion kun tasko propagandi Esperanton inter la membroj de P. T. K., propagandi polan turismon eksterlande helpe de Esperanto, aperigi artikolojn en la esperanta gazetaro pri la evoluo de pola turismo kaj pri aktualaĵoj de la pola vivo; eldonadi esperantolingvajn prospektojn, broŝurojn, gvidlibrojn — kaj estonte — konstantan gazeton esperantan.

La oficiala organo de P. T. K. »Turysta i Auto» enpresigos sciigojn kaj informojn pri la Esperanto-Movado kaj speciale pri la turisma movado tutmonde.

La Esperanta-Sekcio ĉe P. T. K. okupiĝos interalie pri intersanĝo de polaj turistoj-esperantistoj kun aliaj landoj.

## Pri "internacia stilo".

Kun intereso mi legis en la septembra numero la rezonadojn de H. F. pri tiu ĉi temo, kaj tuj mi decidis aldoni kelkajn komentojn. La afero estas ja sufiĉe grava por esti ĉiuflanke preparolata.

Antaŭ ĉio mi volas gratuli al la skribinto pro la bonega »internacia stilo«, kiun li uzas en sia letero, pro la vera majstreco en Esperanto, kvankam li estas tute simpla laboristo kaj studis ne niun gramatikon krom la esperanta, verŝajne eĉ ne la svedan. Sed tio ne estas surprizo por mi: mi konas personojn kiuj skribas kun multaj eraroj sian gepatran lingvon, sed samtempe skribas tre modelan Esperanton. Ĉu tio ne estas miraklo, ĉu tio ne pruvas la grandegan facilecon de Esperanto kompare kun la naciaj lingvoj?

Kiuj studis fremdajn lingvojn, ili scias, kiom malfacila tio estas, kvankam ne ĉiuj volas aŭ scipovas tion konfesi. Ofte la multlingvuloj simple trompas sin mem, kredante, ke post multjara pena studado ili posedas tiun aŭ alian lingvon. Sed oni povas facile kontroli la sciojn de tiuj personoj: donu al ili svedan tekston kaj petu ĝin tuj traduki al la fremda lingvo, sen helpo de vortaro kaj gramatiko, tiam vi vidos kiel »bone« ili konas la lingvon. Mi ofte spertis tion. Alia ekzemplo: estona profesoro, kiu multe studis kaj praktikis la francan lingvon, estante lingvisto, bezonis verki mallongan tekston en tiu lingvo. Sed antaŭ ol presigi la tekston, li devis ĝin doni al naskiĝinta franco por kontrolo. Kion vi opinias pri tio?

Eĉ pli: mi kuraĝas aserti, ke multaj instruitaj homoj ne estas tute kompetentaj eĉ pri sia gepatra lingvo kaj eĉ tie faras gramatikan kaj alian erarojn. Mi ja estas estono, mia gepatra lingvo estas la estona, en la universitato mia ĉefa studaĵo estis la estona lingvo, sed malgraŭ tio mi ofte devas konsulti vortaron kaj gramatikon, kiam mi skribas estonan artikolon. Certe mi ne eraras, asertante, ke 99% de la estona popolo tiam kaj tiam faras erarojn en sia gepatra lingvo, kvankam ili de la naskiĝo ĝin aŭdas kaj uzas. Kion vi opinias pri tio? Certe pli-malpli same estas kun la aliaj popoloj, des pli, ke la estonoj estas relative lingvo-kapablaj, pli ol multaj aliaj popoloj.

## De ĉie - pri ĉio - al ĉiu.

*Ekstere neĝas. Antaŭ mi: neĝamaso el gazetoj. Hodiaŭ mi devas esti tre konciza. Nu jen:*

**ESPERANTO** (Nov. kaj Dec.). E. Privat diras: . . . la granda kongreso okazonta en Stockholm aperigos seriozan koncentriĝon de malgrandaj nacioj por akceli paŝon egaligan en internacia komunikado. — Japana amiko de Esp. D:ro Nitobe mortis; li estis vic-sekretario ĝenerala de la Ligo de Nacioj kaj inter aliaj li faris oficialan raporton en 1922 pri Esperanto kiel helpa mondlingvo. — En la sama numero: artikolo pri »Stokholmo, la bela . . .« kun fotoj (B. Eriksson). — En la lasta numero Privat parolas pri la rezolucio de la japana Esperanto-kongreso en Kioto, laŭ kiu: 1) La vortfarado per afiksoj kaj

La germanan kaj francan lingvojn mi studis ek de la popola lernejo, mi legis multege da literaturo en tiuj lingvoj, eble pli ol en Esperanto, sed al mi estas malfacilege skribi leteron en tiuj lingvoj, kaj mi faras multajn erarojn, gramatikajn kaj stilajn. Mia stilo estas nai-va kaj legante la leteron franco aŭ germano tuj rekonas, ke ĝi estas skribita de eksterlandano. Jes, oni povus diri, ke mi ne estas lingvokapabla, kvankam en la universitato mi studis lingvosciencan. Sed — post mallonga studado de Esperanto mi libere tradukis altnivelajn literaturajn verkojn al tiu lingvo, aperigis ilin en diversaj Esperantaj gazetoj, kaj eldonis ankaŭ tutan libron — »Kvin noveloj« de Fr. Tuglas. Tiam mi estis juna gimnaziano kaj tute nova esperantisto. Kelkaj recenzantoj skribis, ke tiu libro havas vere klasikan stilon. . . .


Mi resumas: Esperanto estas dekoble kaj dudekoble pli facila ol iu nacia lingvo. Sed malgraŭ tio ankaŭ ĝi bezonas lernadon kaj studadon. Kiel simple estas iri, ĉu ne? Sed rigardu la infanojn, kiom pene ili lernas tiun »arton«! Same estas pri Esperanto. Des pli, ke nuntempe mankas ankoraŭ tiaj lernolibroj, per kiuj la memstudantoj povus tute *perfektigi* sin en la lingvo, kaj kie troviĝas ĉiuj detaloj de la lingva mekanismo.

*Henr. Seppik.*



kunmetado estas unu el la esencaj karakterizoj de Esp. 2) . . . oni ne povas formi ian fak-vortaron literaturan, kiel ekz. maŝinfakan ktp. 3) Neologismoj pro bezono de poemfabrikado(?) estas nenio alia ol la degeneracio de la arto poezia; plie en Esp. ĝi signifas danĝeran ludon kontraŭ la Fundamento . . . Ili »energie malrekomendas, pro la bono de nia lingvo, la uzon de neologismoj sen nuanca diferenco aŭ kun perforta nuancigo.» Kaj »Vivu la egaleco de rajtoj de ĉiuj popoloj ankaŭ sur la lingva kampo internacia.» Privat konkludas: »Pruntaĵoj el ekstero en tre malgranda kvanto povas ludi la rolon de salo. En tre granda proporcio, ili ne plu salumas, ili venenas.»

**HEROLDO DE ESPERANTO:** Princo Karlo de Svedujo estis salutita en Osaka de la tieaj samideanoj. — Malgaja novaĵo: Post la patrino mortis ankaŭ la patro de Andreo Cseh. — S-anoj Eller-



*Esp. Fraŭlino Takahaŝi-Ajako transdonas en stacidomo de Osaka al Princo Carl el Svedujo diantan bukedon.*

siek kaj Telling organizos karavanojn al la stokholma kongreso. — La prezidanto de la Esperanto-grupo en Cannes gajnis en la franca nacia loterio unu milionon da francaj frankoj. (*Similan bonŝancon mi deziras al la afabla leganto — kaj al mi dum la nova jaro.*) — 55 francaj deputitoj aliĝis el ĉiuj politikaj partioj al la Grupo por la defendo de Esp. — Franca Esp. Instituto estas starigita. — Montagu C. Butler (anglo) akran kritikon aperigas pri »Basic English». Auskultu: »La plimulto el nomoj de bestoj, plantoj, nutraĵoj, sciencaj terminoj . . . (ekz. leono, anaso, rozo) ne havas lokon en la Basika listo. La malfeliĉa lernanto, kiu deziras mendi rostitan kolombon . . . . . povas eble peti por . . . birdo, kiun Noa forsendis por eltrovi, ĉu troviĝas lando, kuirita per ne-fermita fajro en forno. — La esperanta rostita kolombo ŝajnas preferinda . . .»

**LA ESPERANTA GAZETO** (16. Nov. 1933): El la 46 komunumoj en Nederlando, kiuj havas pli ol 20.000 loĝantojn, nur 8 ne havas delegiton de UEA. — Kiel la aliaj gazetoj, ankaŭ tiu ĉi organo aperigas la bultenojn de la Stokholma Kongreso.

**LA PRAKTIKO** (Novembro): La telefondirekcio de Amsterdam enkondukis la uzadon de Esperanto por la klarigoj ĉe la publikaj telefonstacioj kune kun kvar naciaj lingvoj.

**LA INFORMOJ de ESP. ASOCIO DE ESTONIO** en novembro festis sian dek-jaran naskiĝotagon. (Ni povas gratuli la redaktantaron de tiu bonega esperantogazeto.)

**LA SUDA STELO** (Novembro): Dro J. Domac, eminenta esperantisto, mortis. (Kondolencon!) Li estis meritplena batalanto, prezidanto de la Zagreba societo.

**LIGILO** (Decembro): S-ano Raszka, trajnestro en Bohumin, ĵus komencis sian trian kurson por fervojistoj. Lia merito estas, ke ĉe ĉiu trajno, kiun akompanas la bohumina trajnpersonaro, estas almenaŭ unu konduktoro scipovanta Esperanton.

**ESPERANTOBLADET** (Decembro): Dro O. Fischer, post 3-jara meritplena agado forlasis Norvegujon.



**AUSTRIA ESPERANTISTO** (Decembro): La grupo »Fideleco» festis la 24-an de okt. sian 25-jaran jubileon. (Koran gratulon!)

**L'ESPERANTO** (15. Dec. 1933): La itala gazeto intense reklamas la stokholman kongreson.

**LA SUDA KRUCO** (3. Nov. 1933): La Melbourn-a stacio (Aŭstralio) donas esperantolecionojn. — Anekdoteto el la sama gazeto: — »Ĉu via onklo estis mense sana ĝis la fino?» — »Mi ankoraŭ ne scias. Oni legos lian testamenton morgaŭ.»

**HINDUJO** (1-a nro, Novembro 1933). La celo de la revuo doni variajn informojn pri Hindujo. Abonprezo: 8 belgaj fr. por unu jaro. La redaktanto volonte akceptas subtenon: s-ino Erna Sindhwad, 37. rue Vanderkindere, Bruxelles-Uccle. Poŝtĉeko: nro 97049. La enhavo: La hinda nacia kongreso. La 11 postuloj de Gandhi. Londona Konferenco.

**ESPERANTO KIBOŜA** ne plu aperas. Anstataŭe »Esperanto en Japanujo» estos la organo de la Kiboŝa-anoj.

**SENNACIULO**: (25. dec. 1933.) Herman Platiel skribas: »Ni ne bezonas Esperanton por propagandi naciismon al alilanduloj . . . Ĝi estu unu el la rimedoj por garantii la pagon kaj profunde enradikigi la spiriton de frateco kaj egaleco en la homaro . . .»

**LA KOMERCO**: (Novembro.) Jenaj firmoj eldonis reklamon en Esp. Rencvit-Vitilo-Werk, F. Paris, Basel (Svisl.) pri sanigiloj, Loewen-Apoteko, Bern, pri fernpreparaĵo »Resangon», »Force» A.C. 197. Gt, Portland St., London, pri fortigmanĝaĵo »Force», — The Imperial Typewriter Co, Ltd, Leicester, Anglujo, pri skribmaŝinoj, Cooks Wagon Lits, Berkeley Str., pri siaj vojaĝservoj. Oni nepre skribu al la firmoj, petu la prospektojn, kaj mendu, en aktuala okazo.

**SOVETA KEMIINDUSTRIO** (No 1): La broŝuro utiligas por sia propaganda celo la kontraŭdirojn de la nuna produktsistemo, (neniigitaj produktaĵoj por la niveligo de la prezoj; samtempe senlaboreco, mizero). La hektografita gazeto citas multe da statistikaj datoj.

Bonan laboron kaj grandajn sukcesojn deziras por la nova jaro al ĉiuj Esp. organizoj, gazetoj kaj opaj samideanoj:

F e r s i l.

## LIBROJ KAJ GAZETOJ

**JOSEPH R. SCHERER**: *Ĉirkaŭ la mondon kun la verda stelo.* (Eld. Heroldo de Esperanto, Köln 272 p. Prezo: 5:50 kr. ĉe Eld. Soc. Esperanto, Sthlm 1.

La verkinto de la antaŭparolo, R. Kreuz, la direktoro de ICK konstatas, ke J. Scherer estas la unua praktika propagandisto, kiu persone diskonigis la nomon de nia universala organizo kaj alportis la praktikan helpon kaj kuraĝigon al centoj kaj centoj da samideanoj, fidele batalantaj por nia komuna idealo en ĉiuj prtoj en la mondo. En tiu rilato ni absolute ne povas kontraŭdiri. Ni ĉiuj konas kaj altetaksas la valoron de la Scherer-a mondvojaĝo. Kaj nun la dokumentaro de tiu ĉi mondvojaĝo kuŝas antaŭ ni. Bela volumo kaj se ni rigardas tion, kiel *dokumentaron*, ni povas esti kontentaj, ni legas nomojn, vidos fotojn kaj aŭdas gravajn datojn, kiuj el esperantista vidpunkto estas ege gravaj. Tamen ni devas konfesi, ke la mondvojaĝo meritas pli ampleksan kaj pli riĉe ilustritan *priskribon*: en la nuna formo la libro efikas kelkloke skiza kaj ne sufiĉe ampleksa. Plej bone mi povas klarigi la aferon per ekzemplo. S-ro Scherer vidis belan pagodon kaj belegan urbon en Japanlando. Post kelke da ĝeneralaj rimarkoj li diras: »Niaj gvidantoj . . . klarigis mirinde la belajn misteraĵojn ne per tedaj detaloj, sed per intimaj rimarkoj. Tiel ni povis vere kapti la spiriton de Nikko.» Kaj nun por ni restas nur la demando kial la aŭtoro absolute ne emas malkaŝi al ni la veran spiriton de la bela japana loko, pri kiu ni legas nur

## Vill Du

i din mån bidraga till framgång för "la XXVI-a", kan Du inte göra detta bättre än genom att på all Din post använda vårt märke:



ĝeneralajn rimarkojn. Tamen samtempo ni devas konstati, ke aliloke li sukcesas kun vere logikaj kaj akraj rimarkoj komprenigi al ni mallumajn problemojn. Sed la libro malhavas la egalpezon, kies restarigo estas la tasko de la dua eldono.

*The tenth book of Homer's ODESSY*, translated into Esperanto Hexameters cio, 142. High Holborn, London W. C. 1. Prezo: unu angla ŝilingo. Plezure ni legis la dekan kanton de la Odiseo en arte formitaj esperantaj heksametroj. La tradukinto meritas grandan laŭdon pro lia kuraĝo kaj pro la brave farita solvo de la tasko. Anstataŭ longaj frazoj mi citas parteton por pruvi, kiom fleksebla estas nia lingvo ĉe lerta homo: »Tion ŝi diris. Rapide ekvenis ortrona Tagiĝo.— Ĉirkaŭ mi vestojn la Nimfo, tunikon kaj ankaŭ mantelon — Faldis, sed robon ŝi mem arĝentan kaj grandan surmetis — Bril-elegantan subtilan; kaj zonon tre belan el oro....»  
F. Silágyi.

**DOUGLAS P. BOARTMAN:** *La nekonata konato.* (Eld. Heroldo de Esp. 122 p. Prezo Grm 1.60.) Lerte verkita, longa fantomnovelo, kiu kun granda sukceso intencas rigidigi la harojn de la leganto. Kaj krome la maniero estas arta, la talento de la verkisto esperiga eĉ koncerne pli altajn taskojn. La stilo estas flua, sed ne tute senerara. Kelkfoje li uzas la vorton »unu», anstataŭ nedefinitiva artikolo, kiu laŭ mi estas grava atenco kontraŭ la Fundamento. Ankaŭ la tro ofta uzado de la kunmetitaj tempoj kelkfoje gvidas la cetere lertan verkiston al misvojoj. Jen ekzemplo: »Dum la tuta trankvila posttagmezo .... li estis senĉese parolinta.» Nu, li certe ne estis parolinta dum la tuta posttagmezo, sed *parolanta*. *Resume:* interesa verko.

F. Silágyi.

**AMO PRO PROVERBOJ**, unuaakta komedio de Arthur Azevedo, el la portug. lingvo tradukis A. Couto Fernandes, L. K., 2a eldono, 1932, 12,6×18 cm., 23 paĝ., broŝ. Presejo Junaos Pongetti, Ave-lo, Prezo sv. frk 0.50. Bona traduko de populara komedio brazila.

**Manuskript, avsedda att införas i Svenska Esperanto-Tidningen, böra vara redaktionen tillhanda senast den 1 i varje månad för att kunna hinna införas samma månad.**

## Krucenigmo n:ro 2. (Dec.)

'K	A	R	N	O				'T	A	K	T	A
A		E		'R	'R	O	'G	I		A		N
"K	O	M	"I	Z	O		"R	E	"I	R	A	S
T		"I	D	O	L	"B	I	L	D	O		O
"O	"A	Z	O		O	O	O		"E	T	"A	J
	"M	O	K	"I				"R	S	O	J	
	A		"O	L				"D	E	"L		
	"R	"A	L	O				"O	R	"D	O	
"K	A	T	O		"O	"X	"A		"Ĉ	E	N	"I
R		"I	N	"S	P	E	K	"T	A	S		B
"E	K	N	O	T	I		"R	A	S	P	A	S
I		G		"L	O	G	A	S		L		E
"S	K	I	Z	O				"O	R	I	O	N

Solvaĵo.

### Kial ne provi?

Ofte okazas prelegoj en esperanto. Ĉu vi komprenas ĉion? Tre ofte samideano fremda aŭ sveda alparolas vin esperante. Ĉu vi tuj komprenas? Se ne ekzercu. Tre simpla ekzerco, ebla en ĉiu rondo, eĉ duopa, estas legado laŭtvoĉa. Unue vi uzu simplan tekston: Dialogoj de Dahl, Bengalaj fabeloj, Sonoriloj kaj kanonoj de Isaac, Fabeloj de Andersen, Mensogulo Münchhausen. Nur unu paĝon legu ĉiu, la aliaj aŭskultos. Se vi ne komprenas, petu la leganton legi denove. Kaj se necese traduku. Baldaŭ vi komprenos sen traduko kaj tre rapide. Samtempe, per via propra legado vi lernas klare elparoli kaj ĉiam tiel ke viaj amikoj komprenu. Faru! Kial ne provi?

### Radiokurs i Esperanto från Hälsingfors.

Finska Esperanto-Institutet anordnar varje onsdag med början 17 jan. kl. 18,15—18,40 kurs i radio. Ledare blir Vilho Setälä och lärobok blir hans egen bok »Esperanto-Kurso».

Samtidigt och i anslutning till kursen föranstaltas även en skriftlig kurs i esperanto.

## Svensk-esperantiska ordboken.

Det är många som med otålighet vänta på den nya svensk-esperantiska ordboken. När manuskriptet på ordboken påbörjades, kunde ingen förutse att det skulle bli så drygt. Det var en allmän önskan, att den nya ordboken skulle bli betydligt mera omfattande än den föregående, en ökning i omfånget av 50 proc. förutsågs, men det torde ej förslå med detta.

Då det nu dragit så långt ut på tiden, och då bokens omfång blir så stort, ha vi beslutat oss för att utgiva den i två delar. Det kan ju tyckas, att en halv ordbok icke är någonting att ha, men under förutsättning att man förut äger en svensk-esperantisk ordbok (Backman eller Ohlssons) kan man mycket väl använda första delen i avvaktan på den andra.

Det är vår förhoppning, att första delen skall bli färdig under loppet av januari månad. Det kommer att omfatta minst 208 sidor. Priset är ännu ej fastställt, men det kommer förmodligen att bli 3—4 kronor. Första delen säljes endast häftad. Den som köper första delen kan sedan köpa även andra delen häftad och låta binda båda i ett band.

Beställningar kunna insändas redan nu för expedition så snart boken föreligger färdig.

Andra delen torde komma att dröja ännu någon månad, men arbetet fortgår oavbrutet.

## *Svenska Esperanto-Institutet*

höll årsmöte i Stockholm den 7 januari, varvid samtliga utav de svenska esperantoförbunden utsedda styrelseledamöterna voro närvarande.

Styrelsen godkände direktionens berättelse, revisionsberättelsen, och direktionen beviljades ansvarsfrihet för 1933 års förvaltning.

I institutets direktion nyvaldes för 5 år fil. mag. Karl Söderberg.

Till ordförande i institutets styrelse omvaldes riksdagsman Ernst Eriksson.

Vid årsmötet behandlades radiofrågan, betydelsen av instruktionskurser för esperanto-lärare och möjligheterna att införa esperanto i folkskolan.

## Har Ni prenumererat på Svenska Esperanto-Tidningen 1934?

Med decembernumret följde ett inbetalningskort avseende medlemsavgiften i Svenska Esperanto-Förbundet eller prenumeration på Svenska Esperanto-Tidningen för innevarande år.

Ett stort antal medlemmar resp. prenumeranter ha insänt sina avgifter, för vilket vi tacka dem. I syfte att påminna dem, som ännu ej insänt avgiften, om att de böra göra detta med det snaraste, medföljer ett inbetalningskort även med detta nummer av tidningen. På grund av vissa postala bestämmelser avser detta inbetalningskort endast prenumerationsavgiften. Den som önskar insända avgift som enskild medlem av förbundet får underkasta sig besväret att skriva ett nytt inbetalningskort.

Vi behöva väl ej upprepa vår maning till alla tidningens läsare, som ej erlagt prenumerationsavgiften för 1934, att göra detta *nu*, ty alla förstå säkert att vi bliva glada över att mottaga förnyad prenumeration.

Svenska Esperanto-Tidningen kommer att bjuda så mycket aktuellt och intressant just detta år, kongressåret, att det bör bli en glädje att denna gång förnya prenumerationen. Den allmänna internationella esperantokongressens förläggande till Sverige är den största händelsen i den svenska esperantorörelsens historia, och då är det naturligtvis oundgängligt att alla esperantointresserade läsa Svenska Esperanto-Tidningen.

## *Lyona Internacia Foira,*

8—18 marto 1934, eldonis tre efikan grandformatan afiŝon en Esperanto, same ankaŭ glumarkojn kaj dekon da poŝtkartoj kun esperanta teksto kaj bildoj el la foiro.

## *Esperanta Turista Asocio*

sammanträdde till årsmöte den 7 januari å Beskowska skolan i Stockholm. Styrelse- och revisionsberättelserna godkändes. Avgående styrelseledamöter, E. Malmgren, Hj. Lindstedt och G. Gustafson, återvaldes, liksom även revisorerna B. Eriksson och H. Nordquist.



## Ny studieplan.

Till den för kurser med esperantokun-  
nig lärare avsedda läroboken av språk-  
läraren Jan Massiak: "Lärobok i Espe-  
ranto för ABF och andra studiecirklar"  
har en enkel, praktisk och lättfattlig  
studieplan utarbetats av hr R. Pehrsson.

Studieplanen erhålles gratis av dem  
som rekvirera den nämnda läroboken  
för undervisning i studiecirklar och kur-  
ser.

Till läroboken har författaren utarbe-  
tat särskilda kommentarer (pris 1 kr.),  
vilka äro avsedda för kursledaren, men  
även för dem som använda boken för  
självstudium. Dessa kommentarer un-  
derlätta undervisningen högst avsevärt.  
En lärobok i engelska av samme förfat-  
tare, efter samma plan, utkom före es-  
perantoläroboken och har använts med  
goda resultat. Massiaks lärobok är ej  
vidlyftig, författaren har tvärtom be-  
mötat sig om att medtaga endast det  
grundläggande och det mest behövlige,  
ty det är en allmän erfarenhet, att om  
en lärobok innehåller mycket material,  
hinna kursdeltagarna icke tillgodogöra  
sig detta under kursens gång utan man  
nödgas avbryta mitt i boken.

Kursdeltagarna erhålla läroboken till  
nedsatt pris. (Det är att lägga märke  
till, att boken är inbunden i ett starkt  
klotband som håller kursen ut även om  
boken ofta bäres i fickan)

De som äro intresserade utav att an-  
vända denna lärobok erhålla på begä-  
ran önskade upplysningar från förlaget.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

## Korespondado.

Jenaj danaj samideanoj deziras ko-  
respondi per ilustritaj poŝtkartoj: F-ino  
Ida Christensen, S-ro Gudmund Poul-  
sen, S-ro Carl Simonsen. Adreso por ĉi-  
uj: Preparantlernejo, Skaarup, Fyn,  
Danujo.

S-ro Kijoŝi Kobajaŝi, Tojokaŭa-ĉio, Aiĉi-  
Ken, Japanujo, deziras korespondi per  
leteroj kaj bildkartoj kun gesamideanoj  
de Svedujo.

## Leterkesto.

O. O. Lund. Prof. M ne skribis. Eble  
vi povas peti lin skribi kelkajn liniojn  
pri nia lando, kiel li vidas ĝin? Red.



Den tunna, skarpa  
hållbara men billiga  
rakklingen heter

## D-ro Zamenhof.

Pris pr st. 0:20, 10 st. 1:75.

Eldona Societo Esperanto s.p.r.  
Box 698, Stockholm 1. Postgiro 578

## Unika lernolibro!

## Universala Esperanto Metodo.

De Doktoro Benson.

Enhavanta rektan lernolibron, amplek-  
san ilustritan legolibron, universalan  
multlingvan bildvortaron.

41 lingvoj, 11,000 bildoj. 100 listoj de sam-  
specaj vortoj. 2 plenpaĝaj tabeloj de la  
pronocado de la Esperantoalfabeto en  
36 lingvoj. 5 plenpaĝaj tabeloj de la  
korelativoj en 36 lingvoj.

559 paĝoj. Fortike bindita. Prezo 20 kr.  
ELD. SOC. ESPERANTO, Stockholm 1.

## Raportu!

Reprezentantoj de Eld. Soc. Esperan-  
to kaj vendantoj de Sveda Esperanto-  
Gazeto, bonvolu raporti pri la vendado  
dum la pasinta jaro baldaŭ.

Eld. Soc. Esperanto.

## In- och Utländsk Litteratur

Esperantoavdelning  
Nya Aktiebolaget Biblioteksbokhandeln  
Biblioteksgatan 12, Stockholm